Agnes Miegel,

# Septembro

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Jen la plej karaj tagoj en la jar':
Asteraj floras ĉie en la bedoj,
Trankvilas la aer', la blua klar'
Plenplenas de l' odoro de l' rezedoj.

Ne sonas flugilbato tra l' trankvil';
Nur la cikadoj ĉirpas en la paco.[2]
Nun, sata de la mondo, de l' sunbril',
Animo laca, en vespera bril'
Transiĝu al de l' lasta dormo graco.

*Traduko de la Germana poemo "September" de* Agnes Miegel *(∗1879-03-09 – †1964-10-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1998-09.*

*MR-314-1a / Arg-787-1577 (2013-01-21 21:02:40)*

*Pri la poetino legu ankaŭ jenan artikolon:* http://www.agnes-miegel-gesellschaft.de/biographie/index.html .

[2] aŭ:
Ĉirpadas la cikadoj nur sen laco.